# *Rusio kaj Kubo vetas por pli solidaj rilatoj en Fihav 2023*



**Foto: RHC**

Havano, 6 nov (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel prezidis la malferman ceremonion de la Internacia Foiro de Havano, Fihav 2023, kiu komenci?is en la foirejo Expocuba.

Kun ?eesto de reprezentantoj kaj firmaoj el 60 landoj, Ricardo Cabrisas, vic?efministro kaj ministro pri eksteraj rilatoj kaj fremdaj investoj, invitis la partoprenantojn profiti tiun ?i plej gravan komercan borson por evoluigi siajn negocojn kaj plifirmigi amikajn kaj kunlaborajn komercajn ligojn.




**Foto: RHC**

La prezidento trairis la pavilonojn de la foirantoj kaj la lasta halto okazis ?e la pavilono de la Rusa Federacio kie okazis ceremonio bonveniga kaj parolo? de la rusa ambasadoro en Havano, kiu konfirmis la volon de sia lando ampleksigi la komercajn kaj ekonomiajn rilatoj en diversaj sektoroj.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/338631-rusio-kaj-kubo-vetas-por-pli-solidaj-rilatoj-en-fihav-2023

**Radio Habana Cuba**